

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



Sonorilo

59a jaro n° 4
julio - oktobro 1967

Sonorilo


dumonata bulteno de B.E.F.

REDAKCIO : JAUMOTTE MAURICE
ROOSE FERNAND, SINT-KIARADREEF 59, BRUGGE TEL. (050) 319.81
MAERTENS GRÉGOIRE
POUPEYE CHARLES

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :

DR. POL DENOËL DURWAEL IVO ISERENLANT ROGER

ADMINISTRADO : TERRYJ J. RAAPSTRAAT 72 GENT



ASOCIO SEN PROFITA CELO

SIDEJO & PREZIDANTEJO

DEBRUYNLAAN 44, WILRIJK TEL. (03) 377758

HONORA PREZIDANTO

KEMPENEERS PAUL

HONORA VICPREZIDANTO

SIELENS HENRI

ĜENERALA PREZIDANTO

JAUMOTTE MAURICE

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD, MAGDALENASTRAAT 29 KORTRIJK
DR. DENOËL POL, 20 RUE V. RASKIN LIÈGE

UNUA VICPREZIDANTO

ROOSE FERNAND

VICPREZIDANTO FAKESTRO PRI TEĤNIKAJ RIMEDOJ

ĜENERALA SEKRETARIO

VERSTRAETEN JULES, SINT BERNARDSE STEENWEG 1078 HOBOKEN

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDLINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTER 51, ST-KRUIS TEL. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

PAULUS RAYMOND, 73, RUE DE MONTIGNIES, CHARLEROI

KASISTINO

TERRYJ JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT

POŤKONTO DE B.E.F. : 1634 34 RAAPSTRAAT 72, GENT

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

FR. SCHELLEKENS, FRANS HENSSTRAAT, 44, ANTWERPEN 2
D.K. 9051 25

52-a Universala Kongreso

3-10/8.1967

TEL-AVIV

ROTTERDAM

Se ni donas al la kongreso tiun titolon, estas ĉar prezidanto Prof. Lapenna esprimis la deziron titoli ĝin tiel, por substreki la egalajn meritojn de Israelo kaj de Nederlando. Ni ja scias en kiuj kondiĉoj la unuaj devis ĉesi la laborojn, kaj en kiuj la duaj devis fini la kongreslaborojn. La organizado en apenaŭ du monatoj de, tamen interesa, universala kongreso estis vera "tour de force" kiun ni dankas ankaŭ al la organiza kapablo de la Nederlandanoj. Partoprenis ĝin ĉirkaŭ 700 de la ĉirkaŭ 1300 enskribintoj. Feliĉe, ankaŭ la TEJO organizis samtempe kaj samloke sian internacian kongreson. La kanvason oni ja konas nun; ĝi estas ĉiam la sama kaj montriĝas la plej oportuna; solena malfermo - la multaj sekcikunvenoj kaj tiuj de la fakorganizoj - la somera universitato - la balo kaj aliaj distraĵoj, la ekskursotago - la "Internacia Arta Teatro" ktp ktp. Se vi scias ke ekzistas nun 21 kunlaborantaj fakaj intern. organizoj, tiam vi povas imagi kiom da kunvenoj oni povas ĉeesti de juristoj, kvakeroj, medicinistoj, skoltoj, instruistoj, de la Martinusinstitut, de Katolikoj, Evangeliistoj, Oomoto, kaj multaj aliaj kiujn ni ne detale pritraktos tie-ĉi. Depost kelkaj jaroj iĝis kutimo ke esperantistoj de la organizanta lando prezentas sian landon en ĝiaj multaj facetoj. Tion la Nederlandanoj faris en la kadro de la junulara kongreso per jenaj prelegoj: Robert Groenevelt "Nederlanda politiko" - D-ro Makink "Nederlando kaj la akvo" - Adriaan den Haan "Nederlanda literaturo de post 1860" - Wouter Pilger "Fragmentoj el la Nederlanda literaturo".

La Intern. Somera Universitato prezentis jenajn konferencojn: Prof. Dr. Neergaard "Teknika Asistado al la evolulandoj" - Prof. Dr. Lapenna: "Genocido" - Prof. Dr. J. Regulo Perez "Kontribuo de la Judoj al la formiĝo de la Kanaria loĝantaro" - Prof. Dr. Oton Pancer "Raciigo de la laboro en agrikulturo kaj hortikulturo" - Dr. A. Albault "Kion oni sciuj pri la operacio de katarakto" - Prof. Dr. Cl. Contorno Guglielminetti "Dante, kreinto de interregiona lingvo; Zamenhof, kreinto de internacia lingvo" - J.C. Wells "Lingvoj Piĝinaj kaj Kreolaj". Denove la Internacia Arta Teatro ludis en kaj ekster la kadro de la kongreso. Prezentitaj teatraj(et)oj: Ivan Cankar "Taso da kafo" - Nakamura ŝinkici "Skatolo kiu muzikas" - Eugen Ionescu "La Leciono" - Arkadi Averĉenko "Bona Leciono" - J. Baghy "Holanda Pupo" - Branko Ćopić "Batalo ĉe Kadrono". Plie geartistoj deklamis poemojn de J. Baghy. Mi miras ke oni ne prezentas skizojn de Marjorie Boulton, kiuj estas originalaj kaj tre taŭgaj.

Dum tiuj kongresoj estas personoj kiuj ĉefe amuziĝas kaj ekskursas. Estas aliaj kiuj bone sekvas diversajn programerojn, kunvenojn, paroladojn kaj similiajn. Estas fine ankaŭ kiuj precipe kaj ĉefe laboras. Ili estas la estraranoj kaj komitatanoj. Ni menciuj kompreneble nian prezidanton kiu ne sur tenas en manoj la belgan movadon, sed kiu havas gravajn taskojn en la estraro. Tiuj estraro kaj komitato depost jam multaj jaroj celas sciencigigi la movadon kaj seriozigi ĝin. Ne plu estas tempo por diletantismo. Tio montriĝis klare en la laboroj de tiuj du organismoj. Ni volas reliefigi tion citante unu problemon kiu okupis ilin kaj citante du mociojn akceptitajn. La aludita problemoj estas tiu de la delegitoj de UEA. Estas fakto ke multaj delegitoj ne konsideras sian libere akceptitan taskon serioza. Kaj inter la fakdelegitoj troviĝas ŝajne, unuflanke, fantaziaj fakoj, kaj, duaflanke malkompetentuloj rilate la fakon kiun ili elektis. Oni nun serĉas eblecojn por ŝanĝi tiun malbonan situacion.

Unu de la rezolucioj rilate al turismo kaj preteriras longe la kadron de nur Esperanto. Ĝi estis prezentata de S-ro G.C. Fighiera. Estas bone ke li faris tiel

ĉar efektive Esperanto havas sian lokon en pli vasta kadro. Ni eĉ devas konsili al niaj propagandistoj ke ili traduku la ĉi sekvantan tekston kaj klopodu aperigi ĝin en la nacia gazetaro kaj revuaro.

"La 3a sekcio de la 52a Universala kongreso de Esperanto, okazinta en Rotterdam de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto, kun la partopreno de 1.250 personoj el 35 landoj :

Rekonante la rolon de la internacia turismo por la morala kaj materia evoluo de la mondo.

Plena apogante la celojn de la Internacia Turisma Jaro proklamita de la Unuiĝintaj Nacioj laŭ propono de UIOOT.

Alvokas la registarojn faciligi per ĉiuj rimedoj la liberan fluadon de la turistaj amasoj per :

a) nuligo de la vizoj aŭ simpligo ĝis ekstremo de la formalajoj por livero de vizoj.

b) simpligo de la formalajoj de polic-kontrolo ĉe la landlimoj.

c) simpligo de la dogan-formalajoj kaj plialtigo de la valoro de la tolerata turisma libera importado de memorobjektoj ;

forigo de ĉiuj limigoj de devizeksportado por enlandaj civitanoj vojaĝantaj al eksterlando ; plialtigo de la devizkvantoy je dispono de enlandaj civitanoj vojaĝantaj al elsterlando.

d) forigo de ĉiuj lokaj aviadilejaj aŭ havenaj pasaĝerimpostoj ; aŭ inkluzivigo de ĉiuj tiaj impostoj en la biletprezco ;

e) simpligo de la en- kaj elspigo-proceduroj por pasaĝeroj dum krozadvojaĝoj.

Subtenas la proponon de IATA, ke la pasportoj estu anstataŭigitaj per internacia identeckarto kontrolebla ĉe la landlimoj per elektronaj aparatoj.

La 52a Universala kongreso de Esperanto altiras samtempe la atenton de UIOOT kaj de ĉiuj turismaj instancoj tra la mondo :

1) pri la granda malhelpo, kiun la lingva diverseco prezentas kontraŭ la internacia turismo ;

2) pri la fakto ke la sola pratika solvo kiu respektas la principon de egalrajteco de ĉiuj vivantaj lingvoj (kaj, sekve, de ĉiuj nacioj) estas la enkonduko de la internacia lingvo Esperanto ;

3) ke Esperanto estas jam vaste uzata en turismo, kaj ke ĝia ĝeneraligo alportus nekalkuleblajn avantaĝojn al la turisma propagando, al la profesiaj rilatoj inter turismaj entreprenoj, kiel hoteloj, vojaĝagentejoj, transportkompanioj, lokaj kaj naciaj turismooficejoj, kaj senlime faciligus la vojaĝadon de milionoj da turistoj.

Alvokas al ĉiuj turismaj instancoj ke ili kuraĝigu la disvastigon de Esperanto, ĉefe - malfermante kursojn por turismaj laborantoj kaj por libertempantoj ; - utiligante esperanton en turismaj broŝuroj kaj faldfolioj ; **Sugestas** krome ke la apliko de la internacia lingvo estu urĝe studata en ĉiuj kampoj koncernantaj la sekurecon de la vojaĝantoj ;

Alfable petas al la Sekretariejo de UIOOT ke ĝi komuniku la supran rezolucion al ĉiuj siaj membroj."

Leviĝis antaŭ ni la demando ĉu UEA ne devus plivastigi sian agadon kaj organizi ian turistan agentejon ? Tio altirus eble multajn al E. kaj donus monan gajnon.

La alia rezolucio kiun ni aludis koncernas la mondiskalan peticion kiun ni organizis, kiun subskribis preskaŭ unu miliono da individuaj personoj inter kiuj tre multaj alstaraj, kaj mil tre gravaj organizoj kun entute 73 milionoj da membroj ; la plej ampleksa peticio iam ajn prezentita al internacia instanco surbaze de privata iniciato. Nu, legu parton de tiu rezolucio :

4) La Kongreso konsideras la neklarigatan rifuzon de la Sekretariato komuniki la Proponon al la Ŝtatoj Membroj, aŭ meti ĝin en la tagordon de la Ĝenerala Konferenco aŭ transdorni ĝin al UNESKO, aŭ fari kiun ajn alian paŝon,

kiel kontraŭan al la spirito de la ĉarto kaj kiel malaportunan por la intereso kaj prestiĝo de UN. Ĝi opinias, ke la Sekretariato ne estas kompetenta decidi pri la sorto de Propono direktita ne al la Sekreteriato mem, sed al UN.

5) La fakto, ke la Propono ne estas menciata en kiu ajn oficiala publikajo de UN povas esti interpretita nur kiel intenca priselentado de ĉi tiu amaspropono, kiun subskribis preskaŭ unu miliono da unuopuloj - inter kiuj centoj da mondfamaj personoj kaj miloj da aliaj eminentaj publikaj funkciuloj kaj kulturaj agantoj - kaj kiun, krome apogis preskaŭ kvar mil organizajoj kun ĉirkaŭ 73 milionoj da membroj. La Propono tial prezentiĝas kiel unika laŭ sia enhavo kaj plej granda laŭ la nombro de subskriboj iam ajn prezentita en la kultura historio de la homaro al internacia instanco surbaze de privata iniciato.

6) La Kongreso esprimas sian firman konvinkon, ke unu el la fundamentaj homaj Rajtoj, rekonita de ĉiuj civilizitaj nacioj, estas la rajto proponi/peticii, kio inkluzivas la rajton ricevi respondon. Ĝi tial esperas, ke en la Jaro de la Homaj Rajtoj la Sekretariato rekonsideros sian nekomprenoblan starpunkton kaj entreprenos la necesajn paŝojn por doni normalan sekvon al Propono prezentita la 6-an de Oktobro fare de Universala Esperanto-Asocio en la nomo de ĉiuj subskribintoj.

7. La Kongreso komisias la Ekzekutivan Komitaton de la Asocio komuniki tiun ĉi rezolucion al la ĝenerala Sekretario de UN, atente plue sekvi la evoluon de tiu ĉi afero kaj, se necese, informi la subskribintojn pri la ĝisnuna traktado de la Propono fare de la Sekretariato.

Per tio ni vidas ke ekzistas ankoraŭ rekta kontraŭstaro al nia lingvo fare de personoj kiuj ne povas kaj ne volas malkaŝi siajn motivojn (ĉar ili estas malnoblaj kaj kontraŭaj al la spirito de la Homaj Rajtoj, la egalrajteco de la nacioj k.s.)

Ni ne volas plilongigi tiun-ĉi raporton ĉar detalojn pri la kongreso vi povos legi en "Esperanto", en "La Pratiko" kaj aliloke. Sed pri unu punkto ni volas ankoraŭ atentigi vin. Dum la pasintaj jardekoj ni alvokis la eksterstarantojn veni al nia movado. Nun ni volas aliri ilin. Ni volas nun proponi niajn servojn. Tial nia kunlaborado kun ekz. Unesco kaj aliaj. En la nuna tempo tio estas la bona vojo kaj la bona metodo. Jen unu plia pruvo kaj provo. Ni posedas jam sufiĉe da bonaj revuoj. Tamen la estraro de UEA opinias ke mankas ankoraŭ unu tre grava. En sia festparolado Prof. Lapenna estis feliĉa povi komuniki ke li kolektis jam la necesan kapitalon por aperi ĝin. Ĝi estos : "La Monda Lingvo-Problemo". En la redakcio troviĝos mondkonataj scienculoj, kiuj verkos pri sia specialajo. Tiuj artikoloj estos en la naciaj lingvoj ; sed ĉiufoje kun ampleksa resumo en E. Ni esperas ke tiu revuo trovos lokon en universitataj kaj aliaj bibliotekoj, ke scienculoj kaj institucioj abonos ĝin, kaj tiel, finfine rekonos esperanton kiel ion seriozan kaj taŭgan kaj necesan por la nuna mondo.

HET WELGEKENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken

GROTE KEUS
IN GERED KLEDING

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - GABARDINEN - LODENS
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

Kongresa Rezolucio

La 52-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Rotterdam, de la 2 ĝis la 9-a de Augusto 1967.

AUDINTE la raporton de la Ekzekutiva Komitato de U.E.A. pri la kontribuo de Universala Esperanto Asocio al la Jaro de Internacia Kunlaboro kaj pri la transdono de la Propono por la solvo de la lingva problemo en la internaciaj rilatoj al la Sekretariato de UN la 6-an de Oktobro 1966 ;

PRENANTE en konsideron la decidon de la komitato : per kiu ĝi unuanime aprobis la agadon de Ekzekutiva Komitato, kiu en tiu kazo reprezentis ne nur la Asocion, sed ankaŭ ĉiujn subskribintojn ;

AKCEPTIS en sia ferma kunsido per ĉiuj voĉoj jenan
REZOLUCION

1. La Kongreso konstatas kun kontento, ke la ampleksa speciala Laborplano de la Asocio okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro estis kontentige plenumita kaj ke, rezulte de tiu agado, minimume kvindek milionoj da personoj estis informitaj pri la Jaro de Internacia Kunlaboro kaj pri la ĉefaj aspektoj de la laboro de UN. Ĝi dankas al la Ekzekutiva komitato pro la organizo de tiu ĉi mondskala agado kaj al ĉiuj Esperanto-organizoj pro ilia kontribuo al tiu rimarkinda sukceso.

2. La Kongreso same tiel aprobas la decidon de la Komitato kaj de Ekzekutiva Komitato, lau kiu la Asocio partoprenos per speciala programo en la celebrado de la 20-jara datreveno de la subskrido de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj.

3. La Kongreso esprimas dankon al la Estraro pro la laboro farita en ligo kun la Propono kaj al la delegacio de la Asocio kiu transdonis ĝin al la Sekretariato de UN, kaj plene aprobas la sugestojn de la Prezidanto faritajn en pluraj leteroj al la Sekretariato de UN.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiataj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cemento por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko
telefono 37.88.20

la internaciaj kulturaj ferioj

en la esperanto-kulturdomo, kastelo

«GRESILLON» (23 julio - 6 aŭg. 1967)

Ankoraŭ tro malmulte da esperantistoj ĝenerale kaj de Belgujo speciale konas tiun idealan ripozlokon en ne iu fremda restadejo, sed en NIA esperantista hejmo, la kastelo "Grésillon" apud Baugé, en la belega Loire-regiono. Tie oni loĝas komforte, oni manĝas bone, la kostoj estas malaltaj. Oni povas fari belajn promenadojn en la ĉirkaŭo. Tiuj kiuj volas ekskursi iom pli malproksimen havas en apudeco la belegan valon de Loire. Kion oni povas deziri pli? La administrantaro zorgas ke preskaŭ ĉiutage estas konferenco, laŭ plej diversaj temoj, sed kiujn oni ne devas ĉeesti. Vespere estas iu distra programo, ĉu kantado, ĉu komunaj ludoj, ĉu filmoj. Tiun-ĉi jaron nia redaktoro estis la direktoro de la ferio. Li men donis jenajn konferencojn: Modernaj pedagogio kaj instruado. - Ŝanĝiĝantaj vivkonceptoj kaj ilia efektivigo - Bruĝo - La Flandra Movado. S-ino Roose De Kersgieter konferencis pri sanokonserva nutrado. S-ro Guyot parolis pri: Rabelais, en preparo de la ekskurso al la regiono kie li vivis kaj situis siajn heroojn el la verko "Gargantua kaj Pantragrauel". S-ino Cheverry el Angers konferencis ankaŭ kaj gvidis la ekskurson kie ŝi konatigis al la partoprenantoj multegajn interesajn detalojn. La regionaj gazetoj "Courrier de l'ouest kaj "La nouvelle République" vizitis nin kaj publikigis fotojn kaj raportojn. Pro la fakto ke du konferencantoj ne venis, la direktoro donis plian konferencon pri la ideologio de la Esperantomovado kaj lia edzino gvidis matenon de fizika kulturo por personoj kiuj ne plu estas junaj kaj ne plu regule sportas. Tio lasta havis tre grandan sukceson. Ĉiutage je la 18 ĝis la 19.30a h. okazis debato pri tiutaga temo. Se oni ne ĉiam venis al konkludoj, oni tamen ekhavis multajn ideojn. La vespero de la libro-ekspozicio estis enkondukata de la direktoro kiu donis superrigardon de nia literaturo. Sufiĉe multaj aĉetis libro(j)n. Ankaŭ tiun-ĉi jaron la organizado estis perfekta. Gratulojn al gesinjoroj Guyot; kaj al F-ino Marie Leterme; kaj ne forgesi, al la vidvino Micard, kiu iom kaŝe (en la kiurejo plejparte) sed despli necese kaj efike laboris. Kortuŝa momento estis, dum la unua sinprezenta vespero, kiam tiu kuraĝa virino alparolis la novalvenintojn. Estis momente tre silente; Efektive la memoro pri kapabla organizanto s-ro Micard ankoraŭ ŝvebas tie. Multajn malnovajn kaj karajn geamikojn ni revidis tie: gesinjoroj Chasseriault, ges. Legros kaj la bela Hamburga grupo; De nia federacio partoprenis parte aŭ tute: ges. kaj f-ino Vanbreuse el Verviers kaj ges. Delforge. Ni pasis denove neforgeseblajn agrablajn tagojn. Ĝis la venonta.

Drs. F.R.

Ĉu la vivo havas sencon? Ĉu ĝi havas celon? Ĉu ĝi indas ke ni laboru, ke ni penadu altruisme, sen ia egoismo? Al kio ni nin dediĉu? Ĉu la vivo povas esti kronata per sukceso? Aŭ ĉu finfine ĉio estas vana, sencela, sensignifa? Fama filozofa foje diris al mi ke la vivo nekontesteble estas malsukceso ĉar... je la fino venas la morto. La morto estas tamen ruiniĝo, disfalo, malapero en la nenion. Tiuj demandoj ja obsedas nin ofte, kaj pli kaj pli laŭ nia maljuniĝo. Kiu forto subtenas nin plu? Kiu celo faros nian vivon tamen optimisma, malgraŭ la multegaj nigraj aspektoj de ĝi? Ĉu Dio? Ĉu la kredo ke ni laboras por pli bela estonteĉo surtera de niaj posteuloj? Jen kiamaniere sentas ĉion tion samideano Petro Poliŝĉuk el Taŝkent en Uzbekistano, kiu faris tiun poemon speciale por la legantoj de "Sonorilo".

1	5	9
La jaroj pasas. L' junec' min lasas. Min morto ĉasas... Ho ve al mi..	Ŝi min provokas, diablon vokas. Kaj ĝi min ŝokas. Ho ve al mi..	Nur Li la sola spirit' bonvola, senalkohola, senpeka fort'
2	6	10
Mi kadukiĝas kaj rigidiĝas; stultul' fariĝas.. Ho ve al mi..	L'anim' suferas. Dolor' aperas; ĝi min konkeras. Ho ve al mi..	vin savos de la destin' malhela - edzino bela kaj fia sort'."
3	7	11
Mi nun malbelas. La korpo ŝvelas. Min sorto pelas al agoni'..	Sed iu saĝa, kaj pli kuraĝa, iom pli aĝa konsilas jen:	Sed kio estas? sin kie nestas? kaj kia estas do ĝia nom'?
4	8	12
L'edzin' kverelas; ŝi min martelas; primoki celas per ironi'.	"Vi senhezite, al diablo spite, vin turnu rite al Suveren'.	La belsonanta, ligil' brilanta: ĝi - Esperanto - triumf' de l'hom'.



NIA TRADUKARTO

William Shakespeare, La tragedio de Reĝo Lear, tradukis K. Kalocsay, 160 p. Eld. ŬEA, 1966, serio "Oriento-Okcidento", n-ro 6. Bind. 16,50 gld., broŝ. 14 gld.

Fermu viajn pordojn, lordo moŝto, estas sovaĝa nokto. (Akto II, sceno 4)

Mi estis 17-jara, kiam mi unuafoje legis la tragedion de Reĝo Lear en angla lernejo-eldono, helpe de la nederlanda traduko de L.A.J. Burgersdijk. Tiun legadon mi ankoraŭ bone memoras, ĉar ĝi faris sur mian junan menson neelvideblan efikon. Oni tiam vivis en plena milittempo kaj la mizeran kondiĉon de la homo sur nia planedo, majstre elvokitan de Shakespeare surbaze de malnova kelta legendo, oni ja ĉiutage vidis antaŭ siaj okuloj - multe pli terure - proprakorpe ĝin spertis.

Ne estas do mirinde, ke mi iom preteratentis en la verko la "familian elementon", t.e. la kruelo de gefila sendankeco. Skuis min la malespero de la homo antaŭ la neeblo ripari la malbonon, kiun li estigis per trorapida, senprudenta ago, en momento de mensa blindiĝo, aŭskultante la flatajn vortojn de falsaj buŝoj. Terurigita la maljuna reĝo Lear vidas, ke li ne povas evitigi ke senkulpujoj punpagu pro lia ago. Ĉiam pli li izoligas en la malespero ĝis li fordronas en frenezon. Dume regas senbride kaj ŝtorme ĉirkau li la pasioj de homoj kiuj, senkompatate kaj per ĉiuj rimedoj, batalas por la potenco. "Estas la perejo de tuta malnova, sovaĝa generacio, kiu devas cedi la lokon al pli milda", diras trafe Prof. R. Wulker en sia "Geschichte der Englischen Literatur" (1896).

Nun, post preskaŭ kvarona jarcento, relegante la tragedion en la traduko de K. Kalocsay, mi vekis en mi tiujn malnovajn memorojn, revivigis kaj pliprofundigis sentojn, kiuj antaŭ longe vibris en mia koro. La majstro de nia tradukarto ankaŭ ĉi-foje sukcesis alproprigi al la internacia lingvo elstaran verkon de la mond-literaturo kaj doni al ni kelkajn horojn de neforgesebla beletra ĝuo. Mi ne preparolos detalojn de lia tradukado. Estas evidente, ke ĉiu, kiu riskas sin al tia verko, devas kalkuli pri la problemoj de literaturaj neologismoj kaj gramatikaj licencoj. Mi principe akceptas ĉiujn solvojn, kondiĉe ke ili evitas ekscesojn kaj tiurilate mi ne povas fari iun ajn riproĉon al Kalocsay, konsiderante la nivelon de lia originalo. Prikonsiderante tiun nivelon, mi devas eĉ rekoni ke lia traduko estas facile legebla. Sed precipe ĝi pravas konkrete la riĉajn eblojn de sentesprimado en la internacia lingvo. Jen ekzemple fragmento el la lasta akto, sceno 3:

Eniras Lear kun Cordelia en siaj brakoj. Nobeluloj kaj aliaj lin sekvas.

Lear

Ho hurli, hurli, hurli, hurli! Homoj,
el ŝton' vi estas! Se mi langojn viajn,
okulojn viajn havus, tiel ilin
mi uzus, ke diskrakus la ĉielvolbo!
Jen, ŝi foriris por eterne jam.
Mi scias ja, ĉu iu estas viva
aŭ morta. Jen ŝi morta kiel tero!

Lear

Murdistoj, perfiduloj, peston sur vin!
Mi povus savi ŝin, nun por eterne
ŝi iris for. Cordelia, ho, Cordelia,
atendu iom! Kion do ŝi diras?
La voĉo al ŝi softis ĉiam milde,
ĝentile: ĉe virino eĉ bonega!
La sklavon, kiu tie ŝin strangolis,
mortigis mi.

Per sia traduko de "Reĝo Lear" Kalocsay liveris bonegan studmaterialen al nia lingvistiko kaj beletra kritiko. Li aldonis valoran eron al la serio de la

Shakespeare-tradukoj, kiuj aperis en la lastaj jaroj. Ĉi tie mi strikte limigis min al kelkaj koncizaj konsideroj pri la valoro de la verko por esperantistoj, kiuj ne emas spiciali en lingvo, nek en literaturo, sed tamen strebas al ĉiam pli bona kono de la internacia lingvo kaj interesiĝas pri kulturaj eventoj. Ili aĉetu la libron, ili legu ĝin kaj poste relegu laŭvoĉe kelkajn scenojn, ili analizu kaj diskutu fragmentojn... Kaj mi estas certa, ke ili abunde pliriĉigos sian spiritan trezorejon, mirante poste kiel agrable tiel pasis multaj studvesperoj.

H.C. Anderson, Fabeloj, 1-a volumo, tradukis L.L. Zamenhof, 238 p., kun multaj originalaj ilustraĵoj de Antoni Unechowski. Eld. Heroldo de Esperanto, 1965. Prezo 2 us. dol.

Tre malproksime de ĉi tie, tie kien flugas la hirundoj, antaŭ ol venas nia vintro...

(Komenco de "Sovaĝaj Cignoj")

Estas por mi iom malfacile, ĉi prezentiti al vi la supran volumon. Ĉiun bonon pri la Zamenhofa traduko de la fabeloj de Anderson kaj pri la nova eldono de Heroldo oni ja eldiris okaze de la apero de la kvara volumo (1963).

Se vi ĉi tiun aĉetis, mi ne dubas, ke vi ankaŭ aĉetos (aŭ verŝajne jam aĉetis) tiun, kiun mi ĉi tie provas preparoli. Se vi ne aĉetis la antaŭan, tio sendube okazis pro kaŭzo, kiu rilatas nek kun la interna valoro de la verko, nek kun ĝia eksterajo (ambaŭ ja estas altkvalitaj). Mi do povas nur esperi, ke tiu bedaŭrinda io, kio prokrastis vian aĉeton, intertempe malaperis kaj ke vi nun havos la duoblan ĝuon foliumi ambaŭ volumojn kune.

Tamen, mi devas plenumi mian devon de recenzisto. Tial mi rememorigu al vi, ke aĉetante la mondfajn "Fabelojn", vi pasigos kelkajn horojn de plezura distro (se vi legos ilin dum viaj neokupitaj momentoj), de intensa artĝuo (se vi havas animon aspirantan al la belo kaj bono, kiuj retenas nin droni en la banala mizero de la ĉiutage vivo), aŭ de nesuspektitaj mirindaj malkovroj (se via spirito ŝatas legi inter la linioj kaj lumigi la sencon kaj saĝon post la vortoj). Vi krome revivigos la feliĉan tempon de via infanaĝo, kiam unuafoje vi prenis la fabelojn en la manon (verŝajne en iu abunde kaj varmkolore ilustrita eldono) kaj vi povos konstati kiom da freŝo kaj spontano ankoraŭ restas en via koro.

Ne estas necese ankoraŭ laŭdi ĉi tie la profundan humanecon, la senteman ironion kaj la delikatan, kvazaŭ orientan ĉarmon de la Fabeloj de Anderson. Por ni, simplaj legantoj, Anderson pli bone ol multaj verkistoj de modernaj skoloj sukcesis tralmi la realon, samtempe resti en ĝi kaj leviĝi super ĝi, neniam kaptite per ĝi kaj neniam perdante sin en la haoson de vanaj fantazioj. La stilo de la Zamenhofa traduko bonege reliefigas tiujn kvalitojn. Se vi demandus al mi karakterizi per unu vorto la tradukon, mi dirus: ĝi estas tre simpatia. Sed, por esti justa, mi devas rekoni, ke tiu eco ne tiel forte frapas la okulojn, se ĝin ne subtenus la bela eldono de Heroldo kaj precipe la talento de Antoni Unechowski, kiu bontone ilustris la libron.

Trafoliumante la unuan volumon de la "Fabeloj", vi tuj renkontos en ĝi kelkajn konatojn, ekz. "La novaj vestoj de la Reĝo" kaj "La vireneto de maro". Sed vi same ĝojos pro ĉiu el la dek ses aliaj fabeloj, inter kiuj vi eble retrovos unu, kiun vi antaŭ longe jam aŭdis, sed forĝesis en malgranda polva angulo de via memoro. Mi spertis tion. Subite mia koro ekbatis pli rapide, kiam inter "Lekanto" kaj "Sovaĝaj Cignoj" leviĝis antaŭ mia rigarde la "Persista stana soldato" de mia junaĝo. Post la kruelajoj de la dua mondmilito mi, kiel multaj aliaj de mia generacio, sopiris nur la pacon kaj evitis la gloron de la batajkampoj. Tial mi verŝajne perdis la spurojn de mia stana soldato. Tamen, profunde en mia animo mi gardis simpatian por li. Mi lin trovis ja tiel ĝentila! Li estis unu el dudek kvin stanaj soldatoj, kiujn malgranda knabo ricevis en sia naskiĝtago. - "Ĉiu soldato similis la alian plej precize", sed li sola estis iom diferenca: "li havis nur unu kruron, ĉar li estis fandita la lasta, kiam ne estis plu sufiĉe da stano; tamen li staris sur sia sola kruro tiel same firme, kiel la aliaj sur siaj du kruroj (...)."

Tre kuraĝa estis do la unukrura povrulo! Li aŭdacis eĉ ekflami por bela kastelknabino el papero, kiu havis sur sia silkvesto grandan brilantan stelon. "La malgranda knabino ĉarme etendis supren siajn ambaŭ brakojn, ĉar ŝi estis

La recenzitaj libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo“ (Sro Iserentant R.) Kerklaan 61 Brugge, P.K. 15240

dancistino, kaj krom tio ŝi levis unu kruron tiel alten, ke la stana soldato tute ne povis ĝin rimarki kaj pensis, ke ŝi, simile al li, havas nur unu piedon."

Ĉu vi jam iom divenas la sencoriĉon, kiun enhavas tiuj simplaj frazoj? Ĉu vi jam povas iomete gustumi la belon de la Zamenhofa traduko? Jen ankoraŭ fragmento. La aŭdaca amaventuro de la stana soldato finas tragike, ĉar: "Subite unu el la malgrandaj knaboj kaptis la stanon soldaton kaj jetis lin rekte en fornon, kvankam li tute ne havis ian kaŭzon por tio. (...)

La stana soldate staris tute prilumita kaj sentis teruran varmegon, sed li ne povis distingi, ĉu tio estas sekvo de la efektiva fajro, ĉu de lia tro granda ardo de amo. (...) Li rigardis la malgrandan knabinon, kaj ŝi rigardis lin. Li sentis, ke li disfandiĝas, tamen li ĉiam ankoraŭ staris persiste kun sia pafilo en la mano. Tiam malfermiĝis pordo, la vento kaptis la dancistinojn, kaj simile al silfino ŝi ankaŭ flugis rekte en la fornon, al la stana soldato, ekflamis per hela flamo kaj malaperis. Tiam la stana soldato fandiĝis kaj fariĝis bulo, kaj kiam en la sekvanta tago la servistino elprenis la cindron el la forno, ŝi trovis lin en formo de malgranda stana koro. Sed de la dancistino restis nur la stelo, kaj ĝi estis tute brulnigriĝinta."

La vintraj vesperoj estas longaj kaj ofte monotonaj. Vi ne povas fari kiel la hirundoj kaj flugi tre malproksime de ĉi tie. Tamen mi ne bedaŭras vin, pripensante la ĝojon, kiu ĉi tie mem, atendas vin en la fabelmondo de Hans Christian Anderson.

A. SAMYM

Jose Hernandez "Martin Fierro", Argentina eposo, tradukita de Ernest Sonnenfeld. Eldonita de Prof. Dr. Juan Regulo-Perez, "Stafetó" en La Laguna, Kanariaj Insuloj. Tolbindita. 294 paĝoj. Prezo: 3.80 Us. Dol.

Tiu-ĉi eldono viciĝas en la serio "Oriento-Okcidento", pri kies signifo Prof. Lapenna skribis artikolon (paĝoj 9-10). Efektive, per la publikigo en Esperanto de difinitaj, naciaj, grandsignifaj verkoj, nia movado konatigas ilin en medioj kaj popoloj kie ili restus alie nekonataj; kaj, due, valortaksigas en la ekstremaj mondpartoj la reciprokajn kulturojn. Mi aldonas plian argumenton. La kun reguleco aperado de altaj lituraturaj verkoj evidencigas ke nia Esperanto estas plenvalora kulturlingvo (kaj ne iu provata duonlingvaĵo). Por povi kompreni tiun Argentinan eposeon, necesas unue legi la klaran kaj interesan "prezento"n de Julio Mafud, Argentina universitata profesoro (paĝoj 19-24). La interna apudtitolpaĝo mencias ke la traduko venas el la "argentinkampara hispana lingvo". La mencio ne estas superflua. Efektive, por plene ĝui tiunĉi legaĵon ne sufiĉus la kono de la ĝenerala Hispana lingvo. Oni devus fakte aldoni ankoraŭ alian postulon, nome ke oni estus vivinta certan tempon ĉe la gaŭĉoj en la Pampo. Tial la esperantotraduko kapablas rekrei la originalon nur parte. Ni tuj aldonu ke la sama malfacilaĵo ekzistas por ĉiuj aliaj, naciaj lingvoj. Kaj ni kredas ankaŭ ke Esperanto, estante pli naŭrala kaj pli ĝeneralhoma, kapablas fakte pli bone ol la naciaj idiotismoj proksimiĝi de la originalo. Laŭ nia opinio — kaj en la mezuro laŭ kiu ni kompetentas por juĝi pri tio — la tradukinto majstre sukcesis en tio. Mi tamen devas diri ke la sufikso "oza" (kun la signifo de ia pleneo) ankoraŭ estas ne allasita, do en la uzo ne permesita. Despli ĉar la internacia sufikso "oz", ankaŭ ofte uzita en Esperanto, apartenas al la medicina terminaro kaj havas do tute alian signifon. Alia lingva afero: la admono de la tradukinto ke li respondecas pri la kunmetado de adjektivoj kun substantivoj (p. 15) ne estas pravigo! "Grandkolero" ja estas io alia ol granda kolero (p. 98)!

Fine de la libro sekvas artikolo de Prof. J. Regulo-Perez pri la aŭtoro (paĝoj 283-288). Post la fama Kalevala-epopeo de la Finnoj, post reprezentaj verkoj el Hindujo, Japanujo, Hungarujo, post la "Dia Komedio" ktp, venas nun la verko kiu spiras la atmosferon de antaŭa Argentino. Ĉu tio ne estas valorega por niaj literaturo kaj kulturo?! Ĝi havu grandan, merititan sukceson.

ANTVERPENO

Esperanto-grupo "La Verda Stelo"
Kunsidoj: Ĉiuvendrede en Brasserie
"Capitole", Gemeentestraat 15
Antwerpen je la 20,15a horo.
Postĉeknumero: 726.54,
La Verda Stelo Deurne.

La 19an de majo la verdstelanoj kiuj partoprenis al la 49a Belga Esperanto-Kongreso en Charleroi faris detalan raporton pri ĝi: F-inoj Cl. Peeters, A. Geelen kaj Bl. Geers; S-roj R. Van Eynde, R. Van Humbeek kaj J. Verstraeten.

La 26an S-ro R. Van Humbeek eksperimentis: li enkodukis debatvesperon pri "Ĉu la Edzino laboru eksterdome? kaj ĝin gvidis. Kiam detalo de la problemo estis elĉerpita li lerte kaj sperte antaŭmetis alian detalon! Konkludo: programo refarenda!

La 2an de junio oni sidis "Ĉirkaŭ la Fajro" kies enhavo estis flegita de F-ino Bl. Geers, S-roj R. Balleux, M. Jaumotte kaj J. Verstraeten.

La 9an S-ro R. Van Eynde prezentis dokumentajn filmojn. Denove unu estis en Esperanto: "Gaspée, la bela lando". La adaptiĝo de la teksto estis realigita de la grupa laborsekcio: F-ino Bl. Geers tradukis la tekston, S-ro R. Van Humbeek ĝin parolis kaj S-roj J. Montmirail kaj J. Van Eynde prizorgis la teknikajn.

Dimanĉon, la 11an la ekskurso al Hamoir en la valo de la Ourthe plene sukcesis! Gvidata kaj organizita de S-ro E. Paesmans, plurfoje helpita de S-ro R. Van Eynde, la unutaga vojaĝo kontentigis ĉiujn. 43 Personoj partoprenis ĝin inter kiuj 4 el Loveno kaj 3 el Bruselo! Oni ĝuis plue la amuzan programon de F-ino A. Geelen, la festestrino de la grupo.

La 16an S-ro Fr. Schellekens, anstataŭ ol organizi turisman kvizon kiel anoncite, ree paroladis pri sia vojaĝo al Grekujo de antaŭ kelkaj jaroj. Kompletige li aldonis "historian temon": la Monda Ekspozicio de 1958 en Bruselo. Liaj kelk-centoj da diapositivaj estis kvazaŭ karesado por la okuloj de l'vidantoj!

La 23an la tradician promenadon tra la urbo gvidis S-ro E. Paesmans kiu, laŭ nekomparebla maniero scipovas trovi la pitoreskajn anguletojn en folkloraj medioj!

La 30an S-ro I. Durwael anstataŭis la Prezidanton Jaumotte por disdoni la diplomon, post ekzamo pri simpla kapableco, al la gelnintoj de la la-

GRUPA VIVADO

sta elementa kurso. Tri kandidatoj sukcesis: S-ino Clara Durwael, F-ino Imelda Wuyts kaj S-ro Frank de Roover. Nome de ili S-ino Durwael transdonis belan donacon al la profesoro, S-ro H. de Roover, kaj dankis lin per trafaj vortoj. La profesoro dankis siaflanke, S-ro J. Verstraeten kompletigis la programon per prelego pri iama vojaĝo al Vieno.

La 7an de julio S-ro R. Van Humbeek denove organizis debatvesperon pri "Ĉiovendejoj aŭ grandaj magazenoj".

La 14an dum agrabla kunesto S-ino J. de Hondt kaj S-roj M. Jaumotte, R. Van Eynde kaj J. Verstraeten kontribuis per amuzaj rakontoj aŭ legajoj.

La 4an de agosto S-ro Durwael, La Vic-prezidanto, gvidis la kunsidon en kiu oni preparolis la plej bonan manieron por akcepti jugoslavajn esperantistojn revenontajn de la U.E.K. en Rotterdam.

La 18an: la temo de la vespero "Libertempaj kaj kongresaj Travivaĵoj" donis la eblecon al S-ino Bernaerts raporti pri la vizito de la jugoslavaj kongresintoj al Bruselo. S-ro Jacobin faris la saman (laŭ tre amuza maniero) pri sia gvidado tra Antverpeno de tiuj samaj samideanoj. S-ro J. Verstraeten donis impresojn pri la U.E.K. en Rotterdam al kiu nur dum semajnfino li partoprenis. S-ro Jan Smykalski, pola samideano kiu vizitas la grupon akompanata de S-ro F. Volders, pli detale preparolis la evoluon de la tuta U.E.K. Li citere sufiĉe detale raportis pri la nuna situacio de la Esperanto-movado en sia lando.

La 25an S-ro E. Paesmans paroladis pri Innsbrück kaj la turismaj lokoj kiuj ĉirkaŭas ĝin. Belaj lumbildoj donis plian reliefon al la klarigoj de la paroladisto kiu ankaŭ vizitis Svisujon, precipe Zurich, kaj donis detalojn pri sia restado tie.

FAMILIA VIVO:

Kun plezuro ni eksciis la honorigan novajon pri nia juna membro S-ro Jo Haazen el Antverpeno kiu gajnis la konkurson pri sonorilaristoj en Hilversum: tio por la 2a sinsekva fojo!

FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

Transpreno 119.941 F
Anonime 500 F

120.441 F

Kun danko

(Pagoj akceptataj pere de la pĉ 291429 de Maertens Gr. Sint-Kruis)

Al nia kara Jo refoje ni transdonas niajn korajn gratulojn kaj esprimas nian fierecon pro tiu rimarkinda venko!

L.E.A. (Loveno)

Jen, la fino de la feria periodo kaj la sojlo de nova agadaro. Ni ne tro fanfaronas dirante ke nia malgranda societo iom trovas la taŭgan mienon, la vojmontrilojn al Esperantujo. Oni ja povis nombri ĝiajn anojn ĉe la partoprenantaro de kongresoj, en sumejoj, kpt. Kvankam ankoraŭ mankas la ampleksa aktiveco kiel ĉe... (vi ja konas ilin!) tio ŝanĝiĝos en la tuja estonteco. Estas ja kapitalo je junaj ge-novbakituloj kiujn ni certe laborigos. Kaj la "barbuloj"? Ni zorgu ke ili ne fariĝos senlaboruloj, almenaŭ ne en nia movado. Ĉirkaŭ "Peterman" ĉio estas ebla.

"Paco kaj Justeco" Brugge.

Ekzistis ne grupa agado dum la du someraj monatoj. Sed ope la gemembroj laboris. S-ro Iserentant zorgis precipe pri akcepto de eksterlandaj gesamideanoj. Ankaŭ la prezidanto havis viziton de la grupo el Manchester kun la bonega esperantisto-direktoro Norman Williams. S-ro Maertens laboris en la universala kongreso kaj la prezidanto kun edzino en la intern. Kulturaj ferioj en kastelo Grésillon. Dum la estrarkunveno, la unuan jaŭdon de sept. ni preparolis la plej gravajn problemojn de la grupo kaj de la federacio, kie ja kelkaj el ni havas gvidajn postenojn.

jaŭdon la 5an de oktobro venis al nia grupo (kiel ĉiujare;) por rakonti pri sia vojaĝo S-ro G. De Brouwere, nia prezidanto de la Nederlandlingva sekcio de BEF. Denove li kunportis amason da diapositivaj plej belaj. Estis nun Tailando, Makao, Hong-Kong kaj Japanujo kiuj estis al ni montrataj. Ankoraŭfoje S-ro De Brouwere rimarkis speciale la vivon de tiuj gentoj. Pri tio li detale rakontis kaj montris ĝin. La kunveno daŭris de kvarono post la oka ĝis kvarono antaŭ la deknua, kaj ni ne rimarkis tion. Tiel ni estis kaptitaj. La komentario estigis ankaŭ ofte eksplodon de rido. La bela salono Maranatha estis plena. Ni salutis la ĉeston de gemembroj de la Bruĝa Grupo Esperantista, de la regiono ĉirkaŭ Bruĝo, eĉ unu samideanon el Rotterdam, kaj kompreneble fortan delegacion de la junulara grupo.

En la sama ejo komenciĝas la 10 de okt. nova kurso.

La Junulara grupo.

Ni havis kelkajn laborkunvenojn kaj kelkajn ekskursojn. Ankaŭ granda nombro de niaj gemembroj feriiis en la eksterlando.

Menciinda tamen estas la vizito de 23 el ni al la scienca muzeo en Gent kie ni estis akceptitaj de Prof. Quintyn persone.

Ni planas ankoraŭ viziti la geesperantistojn el Eeklo.


LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO 3

Tel.: 16.89.92 Entrepreno de

KONSTRŬAJOJ



Anoncoj

KORESPONDADO

- 1) Muzikinstruistino deziras korespondi kun sinjorino, eventuale poste ebleco por trapasi someran ferion en Hungario, kaj reciproke.
Maria KAMARAS - PECS, Str. Rakoczi 38.II.3 Hungario.
- 2) Studentino deziras korespondi: F-ino HORVATH Eva KOMAROM - Laktanya Köz 26 - Hungario.
- 3) 16-jara lernantino ŝatus interŝanĝi poŝtmarkojn, bildojn de filmaktoroj, k.t.p.
DROSDJAK Judita BUDAPEST III-a, Haraszt u. 16-Hungario.
- 4) S-ro Valerio DEBOV, 4, rue Profsionznaia IVANOVO/obl./U.R.S.S. deziras korespondi, li ankaŭ konas la francan lingvon.

Ses 19 jaraj Rumanaj studentinoj kaj unu kvardekjara profesoro deziras korespondi kun samaĝaj gestudentoj. Ili deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, bildkartojn pri interesaj urboj kaj pejzaĝoj, fotojn de artistoj kaj de filmsteloj. Tre serioza korespondado.

- F-ino Viorica Maftai ; Str. G. cosbuc Nr. 234 NASAUD - Reg. CLUJ Romania.
F-ino Mariana Stanciu ; Bulv. Independentii Nr. 97 POIANA - TAPULUI ; Reg. Ploiesti Romania.
F-ino Elena Ivascu ; Str. Florilor 17 (Zamora) POIANA-TAPULUI - Raion Cimpina - Reg. Ploiesti Romania
F-ino Emilia Grigorescu ; Str. Alex Cel Bun - Bloc 19/2 Sc. A. ap. 3-porter orasul ; BACAU Romania.
F-ino Georgeta Stefan ; Bulv. Republicii Nr. 23 orasul SINAIA Reg. Ploiesti Romania.
F-ino Elena Jais ; Str. Florilor 30 POIANA TAPULUI Raion Cimpina Reg. Ploiesti Romania.
S-ro Albu Stefan orasul : NASAUD - Piata Noua 2 Reg. Cluj Romania.



**Ensendojn por la
novembro - decembro
numero ni petas
antaŭ la 15.11.1967**

2a Scienca Konkurso de GEJ

Germana Esperanto-Junularo ankaŭ ĉi-jare aranĝos Sciancan Konkurson lige kun la 11a Internacia Seminario, kiu temas pri "religio, filozofio" kaj kiu okazos supobleze en Würzburg inter 27-12-1967 kaj 3-1-1968.

Per tiu Scienca Konkurso GEJ celas instigi pli vastan nombron de junaj personoj (ĝis 35 jaroj) okupi sin pri la seminaria temaro.

La kompleta Konkursa Regularo estas trovebla en Germana Esperanto Revuo n-ro 7/66 sur p. 81 (petu ĝin de Herm. Behrman, Volksschule Süd, 4972 Löhne-Oberbeck, Germanio). Jen la plej gravaj punktoj:

La konkursoj prezentu siajn tem-proponojn al la Sekretario de la Konstanta Komitato de la IS, Uwe Joachim Moritz, Hafenstr. 75, 44 Münster, Germanio. Post aprobo de la tem-propono ili sendu ĝis 1-9-1967 tajpitan manuskripton 10 - 30 paĝan, en kiu ili traktis problemon el difinitaj kampoj de religio aŭ filozofio kaj en kiu ili prezentas laŭeble tute novajn, modernajn aspektojn. Ili devas havi ĉiujn rajtojn pri la kontribuajo. En kazo de premiigo tiuj rajtoj transiros al GEJ.

GEJ elektos juĝantaron, kiu decidus pri la atribuo de 3 premioj. 1a premio: senkosta restado en la 11a IS aŭ egalvaloro; 2a premio: 50 GM; 3a premio: 30 GM. Krome la jurio povas atribui al eminentaj junaj talentoj Rekonan Premion.

Laŭeble la premiitoj partoprenu en la 11a IS kaj tie voĉlegu siajn kontribuajojn. La premiitaj kontribuajoj estu eldonataj en formo de kajero aŭ libro.

NOVA OFICIALA ESPERANTO-BROŝURO.

La dana ministerio pri eksterlandaj aferoj eldonis novan broŝuron kun Esperanto-tekstoj kun la titolo «Danio en Bildoj». Ĝi estas senpage ricevebla ĉe ĉiuj danaj ambasadorejoj kaj konsulejoj. Ni sendube ne bezonas substreki la gravecon de eldono de tia oficiala broŝuro. Cetere la broŝuro estas tre bela kaj interesa. Ni tial admonas vin peti la plaĉan novan broŝuron ĉe la plej proksima dana ambasadejo aŭ konsulejo.

Cetere ankoraŭ ĉiam estas senpage havebla la speciala numero de la interesege kultura revuo «Norda Prismo» kiu pritraktas Gronlandon. Ankaŭ demandi ĉe sama Dana ambasadejo. Adreso: Rue Belliard straat, 56 Brussel 4 Bruxelles.

manufakturaĵo ĉirĉo DE BROUWERE

Magdalenastraat 29 Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216 54

VIRINAJ BLUZOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko
por la eleganta sinjorino
la perfekta konfekcio
fabrikita el plej
altkvalitaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj
konfekci-butikoj

PRECIPAJ CENTROJ:

Antwerpen	: Aalmoezenierstr. 2
	Anselmostr. 17
	Nationalestr. 87
	Leysstraat 10
Arlon	: 12 Marché-aux-Légumes
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Anspachlaan 194
	Oude Kleerkoperstr. 31
Gent	: Brabantdam 21
Herstal	: 4 Rue Large Voie
Leuven	: Bondgenotenlaan 13
La Louvière	: 16 rue Albert 1er
Luxembourg	: 67 Place de la Gare
Mechelen	: IJzeren Leen 32
Oostende	: Kapelstraat 23
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: 75 Rue Royale
Turnhout	: Herentalstr. 6
Verviers	: 2 Pont St. Laurent
Wetteren	: Jos Buyssestr. 39-a